
**KOB001** \$29.50

**KVAR NOVELOJ, Valerij BRJUSOV.** Here is Esperanto at its most useful: a key to discovering great classic works of literature which are largely unknown outside of the culture which produced them. Bryusov is best known as one of the founders of the Russian school of poetic symbolism, although his prose works were also influential. Any of these four short stories can be easily read at a single sitting: deep thoughts in small places. 1999. 24p. 195x140. Paper. Russia.

**KVA006** \$2.20

## BRIDGE TO ICELAND

During my recent participation in the annual Yule-season pageant called Christmas Revels, the men's chorus was singing an olde Icelandic song called "Olaf Lylros" for which we had a translation of the title ("Olaf Lily-Rose") and the barest hint about the meaning of the text. Since it always helps a singer to know what a song is about, I decided to contact UEA delegates in Iceland to ask for translation assistance. I sent two faxes and three e-mail messages to likely candidates in the *Jarlibro*. Within a few hours, I received a reply from a certain Kristjan Eiriksson expressing his desire to be of service, and requesting details about the task at hand. I asked for the complete text of the poem, or its URL if it were avail-

able on-line, and a decent Esperanto translation if that existed. By the next day Kristjan had either found or typed the entire poem in Icelandic, a Victorian translation into English, and a literal translation into Esperanto, which latter was (I suppose) his own work. Using the Esperanto translation as a bridge, I was able to write a literal English translation, so that my fellow chorus-members would have a good idea about what each word means. Needless to say, my fellow-singers were amazed that I could so quickly find such esoteric literary assistance by means of the International Language. Kristjan also sent me a copy of the magazine *La Tradukisto* which is a handsome and well-printed literary revue of Icelandic writings trans-

lated into Esperanto with some occasional translations of original Esperanto literature into modern Icelandic. This truly fascinating and esoteric journal contains 24 pages, and appears thrice yearly. Anybody wanting to subscribe or receive a sample copy should write to:  
Hilmar Jon Bragason  
PO Box 31 Tröd  
IS-840 Laugarvatni  
ICELAND

It costs only \$9 for a year's subscription. The UEA-konto for *La Tradukisto* is hjbr-l. The next issue (#35) includes translations from 12<sup>th</sup> and 13<sup>th</sup> century descriptions of Viking travels to Greenland and North America around the year 1000.

Miko SLOPER (Berkeley CA)

## Menciinde

While surfing Esperanto sites on the Web, I ran across an out-of-date telephone number for ELNA. It occurred to me that many web sites probably had similar obsolete info... and then the light bulb went on. Someone with the time to handle this could use one of the Web search engines to deliberately look for "bad" information, and then ask the owners of that bad information to fix it! I asked Rich Ware to handle this and he reports that using a variety of search engines, he tracked down two dozen web sites that displayed ELNA's old 800 number, and sent a message to the owner of each, pointing out the new number, and asking them to update their web-pages. Some eight web-page editors have fixed their pages, or promised to do so, so far. (David WOLFF)

Gratulojn al Jennifer Korp (Chesterfield MO/Seattle WA), kiu edziniĝis meze de junio ĉi-jare.

Adiaŭon al Francesco Valentino (Bronx NY), forpasinta antaŭ nelonge. Adiaŭon al Hazel H. Heusser (Portland OR), forpasinta en majo 2000.

## Loke kaj regione

La 9an de marto 2000 Rochelle F. Grossman (Elmhurst NY) reprezentis ELNAn dum oficiala tagmanĝo aranĝita – en la manĝosalono de UN – de la novjorka filio de la usona komitato por Unifem (UN Development Fund for Women). (*Novjorka pris-mo*, Apr 2000)

Membroj de la E-komunumo en la San-Franciska regiono organizis budon ĉe la Ter-Tago okazinta la 22an de aprilo 2000 en Berkeley (CA). Oni disdonis diversajn informilojn pri Esperanto kaj kolektis nomojn de personoj kiuj volas scii pli pri nia lingvo.

*La Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco* okazos ĉi-jare en Trukee (CA), inter la 22a kaj 24a de septembro. Por pliaj informoj oni sinturnu al: Natalie Sera, 735 Stoker Av, Reno NV 89503; ✉ nsera@powernet.net. (*Sferilo*, May 2000)

La ĉi-jara *Nord-Okcidenta Regiona Esperanta Konferenco* okazos inter la 29a de septembro kaj la 1-a de oktobro en The Quality Inn of the Wad-

dling Dog (Saanichton BC, Kanado). Por detaloj kaj aliĝoj bonvolu kontakti: Wally Du Temple, 765 Braemer Av, North Saanich BC, Kanado; ✉ dutemple@mail.islandnet.com.

*La Aŭtuna Renkontiĝo Esperanta en Okemo (VT)* okazos de la 7a ĝis la 9a de oktobro 2000 en Okemo Mountain Resort, Ludlow. Por pliaj informoj turnu vin al: ESK-OKEMO 2000, 6358-A rue de Bordeaux, Montréal PQ, Kanado H2G 2R8; ✉ esperanto@sympatico.ca. (*La River-ego*, Printempo 2000)

*La 5a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto* okazos en Hotelo Bamer (Meksikurbo), inter la 15-21 aprilo 2001. Por pliaj informoj kontaktu la Meksikian Esperanto-Federacion, Apartado Postal 10576, MX-06000 México DF, Meksikio; <http://www.punto-y-aparte.com/esperanto>. Usonanoj povas kontakti ankaŭ: Bill Maxey, PO Box 36, Powhatan VA 23139; ✉ bmaxey@visi.net.



time like a Balkan folkdance, but midway through it changes course to feature a virtuoso display of exhilaratingly accelerating singing by the trio of women who give Kajto their distinctively gorgeous sound. Marita Kruijswijk, Marian Nesse and Ankie van der Meer all have beautiful and expressive voices when singing solo parts, but the symbiotic interaction between the three is overwhelming!

The lullaby "Dormu milde" is guaranteed to cause restful contentment regardless of the listener's age and time of day, but might also moisten some eyes with tears of sweet joy: yes, it's that beautiful.

The quartet has included another short but sweet round "Rezono" (in two versions!) and finish the CD with the round with which they finish all live concerts "La lasta kanto". I suspect that I am not the only listener who will be reminded by this of an earlier

performance, and smile deeply while remembering a gathering of friends at an Esperanto convention.

The only problem with this CD is that it is too short: there are only ten tracks, which total less than thirty minutes of music. Ultimately quality outweighs quantity (a small jewel is still a jewel!), but this collection leaves me wanting more.

Miko SLOPER (Berkeley CA)

*Valso por amikoj. Ĵomart kaj Nataŝa. KD+tekstfolio. Kodo: VAL001. Prezo: \$20.10*

Kun la muziko de la duopo Ĵomart (Amzeyev) kaj Nataŝa (Gerlaĥ) mi konatiĝis pere de ĝia kasedo *Debuto en eksterlando*, registrita antaŭ 10 jaroj en koncerto en Hungario. Intertempe la du sovetidevenaj gekantistoj nun vivantaj en Svedio eldonis kelkajn pliajn kasedojn.

*Valso por amikoj* "lanĉiĝis" dum la 84a UK en Berlino, kie mi havis la plezuron aŭskulti la du en koncerto. Samokaze mi ĝuis renkonti ankaŭ ilian nemuzikan "kreaĵon" – ilian ĉarman filinon, al kiu la feliĉaj gepatroj dediĉas ĉi-diske la kantaĵojn *Malgranda miraklo* kaj *Filineto*, en kiu povas aŭdiĝi eĉ ŝia voĉo.



Alia peco, kiu povus plaĉi al infanoj (kvankam dediĉita "al esperantistoj de la stokholma esperanta klubo") estas *Ranetoj*. Ĉio venas de l' nenio memorigas la aŭskultanon pri budhismo ("Ĉio venas de l' nenio/Kaj foriras al malpleno") kaj plaĉas pro sia muzikeco, kiun pliriĉigas la fluto de Nataŝa. La tristecon de *Pasero* – dediĉita al Lena L. – pligrandigas en miaj oreloj la memoron de tiu vigla Lena, kiun mi iam havis la plezuron koni. Ĉu al la sama "perdita amiko" dediĉitas ankaŭ *Mi perdis amikon?* En *Papago* oni povas facile rekoni niajn (ĉieajn?!) politikistojn, en kies "kap" malforta/Kiel en poŝta kesto/Nur vortoj." La titolkanto ŝajnas esti donaco al "ĉiuj niaj amikoj, kiuj subtenis nin dum la malfacila tempo". Se tio aludas la malfacilan tempon de enmigrinto, mi bone povas kompreni ĝin.

La muzikon de ĉiuj kantoj komponis Ĵomart, kiu ankaŭ verkis plejparton de la tekstoj. Inter la kantoj, kies tekstojn ne verkis Ĵomart, *Fajrero* elstaras.

Tre plaĉas tiu ĉi nova aldono al nia originala diskografio, kvankam persone mi preferus sur la kovrilo pli belan kaj altkvalitan foton. Sed, nu, temas pri kolekto de muzikaĵoj ne de fotoj.

Ionel ONET (Berkeley CA)

*Ŝako. La Porkoj. KD+16-paĝa broŝuro. Kodo: SAK001. Prezo: \$15.60*

Ĵus ĝuinte plaĉan Paskon ĉe mia patro (kaj plenplenan da bonega paska ŝinko) mi sidiĝis por aŭskulti *Ŝako*'n, la novan kompaktdiskon de La Porkoj. Eble pro ĉi lasta mi nun emas ekmanĝi koŝere.

La disko, pakajo kaj teksto-libreto estas tre belaspektaj, kaj la teknika kvalito kaj de la registrado kaj de la prezentado estas alta. Estus bone, se la kantoj estus verkitaj kun samnivela zorgo.



Unue, la matematiko ĉagrenas: sur disko kun tipa prezo troviĝas nur 9 kantoj, kaj entute nur iom pli ol 25 minutoj da muziko! Sep el la kantoj estas tre similecaj, kun tekstoj nefluaj, foje kriptaj, kaj egege ripetemaj, kaj kun ritmoj kaj melodioj, kiuj nemulte varias. (Se vi hazarde ŝatus unu, ĉiuj certe plaĉus al vi – kaj male.)

Tamen, La Porkoj unu perlon ĵetas antaŭ nin: Alejandro Cossavella verkis du kantojn, akompanatajn nur

de akustika gitaro, el kiuj la dua, *Jen*, aparte plaĉas, kaptinte tre lerte la econ de amrilato, kiu finfine pruvigas maltaŭga pro tro diferencaj personecoj. Tiuj, kiuj emas aĉeti diskojn pro nur unu bonega kanto trovos *Ŝako*'n inda.


Charlie GALVIN (San Francisco CA)

## Recenze

*Ivan la Malsaĝulo*, Lev TOLSTOJ. Trad. V. A. ŜIROKOV. Ilustraĵoj de TAKEHANA To. Toyonaka: Japana E-a Librokooperativo, 1998 (dua reviziita eldono). 76p. 210x150. Broŝurita. ISBN 4-930785-45-6. Kodo: IVA001. Prezo: \$8.10

Kiel sekvas el la postparolo pri la historio de la traduko en Japanujo, la libreto eltenis kvin E-eldonojn (kaj eĉ pli multajn en la japana), kio demonstras neatenditajn flankojn de inter-kultura influo. Ja ĉi-verko de la mondfama rusa klasikulo (verkita en 1885) ne apartenas al listo de vaste konataj kaj speciale ŝatataj verkoj de L. Tolstoj, laŭ mia scio.

Post la unuaj linioj la legantoj havas la impreson ke ĝi eble estas stiligo laŭ la naivaj rusaj popol-fabeloj, sed tre baldaŭ evidentiĝas ke fakte temas pri parabola prezento de la aŭtoraj filozofiaj kaj sociaj konceptoj. Kronologie la verko apudiras kun kelkaj profunde kristanismaj rakontoj, kiel ekzemple *Du maljunuloj*, en kiuj L. Tolstoj penas montri ke la vera kristanismo estas ne tiom en bonaj vortoj kaj ritoj, kiom en bonaj, sinoferaj agoj. En *Ivan la Malsaĝulo* tamen ne temas pri religio. La scenejo de la verko estas tipa fabela patriarkeca Rusio kun Caro (en la traduko "Reĝo", kio stile ne tute ĝustas), nobeluloj, kamparanoj kaj eĉ diabloj. Sur tiu ĉi fono disvolviĝas eventoj, en kiuj klare videblas kvazaŭ por-programaj konceptoj de L. Tolstoj, poste multe kritikataj de liaj diversaj oponentoj inventintaj la terminon "tolstojeco". Ne en tiu ĉi loko indas profunde diskuti kio ĝi estas: en la verko aperas ideoj tute diversaj. Iuj certe estas brila klarvideco, ekzemple ke militistoj uzas kanonojn muntitajn sur... flugantaj maŝinoj (aer-balonoj), kaj ili pafas per serioj po mil kugloj – kaj ĉio tio en la jaro 1885, kiam restis ankoraŭ kelkaj jardekoj ĝis invento de mitraloj! Aliaj



ideoj, kiel tiu pri supereco de laboro mana kontraŭ laboro mensa, ŝajnas al mi eĉ ne konvenaj por tiom granda majstro. Tamen legantoj juĝu mem.

De vidpunkto lingva, la libreto legiĝas glate, tamen ĉeestas multaj mistradukaĵoj veturantaj de la antaŭaj al la postaj eldonoj sen kompari kun la originalo. Oni devus komenci la korektojn de la titolo mem. Devus esti: "La rakonto PRI Ivan la Malsaĝulo kaj PRI liaj du frat... anstataŭ la uzita prepozicio "de".

Sur p. 5 la frazo "Kion Ivan diros pri tio?" envere tute ne estas demando. Vera signifo: "Estu kiel Ivan diros."

Sur p. 7: ne "... malpacigu ilin, ĝis ili fine grimacos per la okulo unu kontraŭ alia", sed "ĝis ili fine elgratu okulojn unu de la alia".

Sur p. 25: ne "... por amuzi infanojn en ferio", sed "por amuziĝi kun geamikoj dum ripozo".

Sur p. 36: "... senedzina viro" devus esti unuvorte "fraŭlo".

Sur p. 38: ne "... Ivan sentis kompatinda ankaŭ la filinon", sed "... sentis kompaton ankaŭ al la filino".

Sur p. 40: frazoj "... kaj kiam iu kontraŭstaris lin, ... Kaj ĉiuj komencis timi lin" devus esti jenaj: "... kaj li ĉesis militi kaj tenis la soldatojn nur por fortimigi la malamikojn".

Sur p. 45: "... senokupe maldiligentas" devus esti "... senokupe diboĉas".

Sur p. 49 devus esti: "Li ĉesis fari ekstravagancajn planojn kaj nur volis simple vivi...". Poste sur la sama paĝo anstataŭ "... fanfaronas, ke li aĉetos la Reĝon kaj lian edzinon" devas esti nur "... ke li aĉetos la Reĝinon".

Jen ampleksa, kvankam ne plena listo de rimarkitaj traduk-eraroj. Tamen la libreto nepre legindas por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la pensoj kaj konceptaro de Leo Tolstoj (1828-1910), kaj tiuj kiuj volus ne nur ĝui liajn famajn verkojn, sed ankaŭ scii pli pri lia filozofio.

Alexandr GOFEN (San Francisco CA)

*Neĝulino kaj aliaj fabeloj*, Fratoj Grimm. Tradukis D-ro Kabe. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1999 (tria eldono). 94p. 200x140. Broŝurita. Kodo: NEG001. Prezo: \$5.20

La sep nanoj sen distingaj personaj trajtoj. Cindrulino sen fea baptopatrino. Jen du "originalaĵoj" de la Fratoj Grimm, kiujn prezentas al ni la tradukinto. "Originalaĵoj" en la senco, ke ili estas tradukoj el la germanaj tekstoj kiujn prezentis al ni tiuj kunlaborantoj antaŭ preskaŭ du jarcentoj. Tamen la vera originaleco restas pli frua, foje en praantikvo. Fratoj Jakob (1785-1863) kaj Wilhelm (1786-1859) registradis por la posteularo kaj starigis normojn.

Kabe estas tiu kapablega tradukisto Kazimierz Bein (1872-1959), kiu en 1911 "kabeis" (defalis de la E-movado). Per *Antaŭparolo* ni ekscias, ke lia unua eldono aperis en 1906, kun 28 fabeloj. La dua alvenis en 1939, kun nur 14 el la kolekto. Ĉi tria (1999) estas fotoreprodukto de tiu dua.

Inter la ceteraj rakontoj estas ekz. *Lupo kaj sep kapridoj*; *Joĉjo kaj Margenjo* (ne *Johnny and Margie*, sed ...); *Knabo-Fingro*. Tralegante la diversajn, oni tuj faras komparon kun postaj versioj de kompanio Disney kaj aliaj. Tiuj en la libro supoze estas en pli pura formo, sen ŝanĝoj nome de iu aŭ alia politika praveco. En *Fiŝkaptisto kaj lia edzino*, la loĝejo laŭ Grimm rangas de humila budo al papa palaco; fine la edzino volas fariĝi Dio kaj sin trovas kun la edzo ree en la budo. Laŭ iuj aliaj versioj, la lasta deziro estas simple "regi la sunon kaj lunon" – eble por eviti blasfemon. Intere tamen estas, ke tiu budo estas eĉ pli humila en iuj variantoj: jen porkejo, jen pispoto.

La fabeloj estas plejparte efikaj en relative simpla Esperanto. Verkemuloj eble povas doni al si defion "plibonigi" per pli aktualaj stilaĵoj. Ekzemple, tiuj sep nanoj en la titola rakonto fakte estas nomataj "malgrandeguloj" (tamen en iu versa parto "pigmeoj").

Ĉi tiujn publike posedatajn rakontojn oni ja rajtas modifi laŭplaĉe. Kiu vere havas aŭtoritaton diri, ke Disney-versio havas malplian indecon ol la Grimm-a? Sed koni la Grimm-an estas en si mem nepraĵo, por kompreni la heredajn kaj la evoluon de tiuj rakontoj.

Reginald JADERSTROM (Mililani HI)

## Esperanto in the media

● a paragraph discussing formal pronouns in different languages, Laurie Bauer & Peter Trudgill acknowledge that, "... a language like Esperanto, which was constructed specifically to simplify communication between language groups, is in all likelihood easier than others in this particular respect." (*Language Myths*, Penguin Books, 1998, p. 52)

I can't recommend enough Suzette Haden Elgin's book *The Language Imperative* (Cambridge: Preseus Books, 1999) to all those interested in "How learning languages can enrich your life and expand your mind". Says Haden Elgin, "I have taught Esperanto to English speakers, both adults and children. Much of its vocabulary is transparent for those who know English, and they find its core grammar rules simple and easily remembered."

"I assume the EU regards an interlanguage as a crackpot idea; although there must be an Esperantist or two out there who will come forward to defend the idea, created languages are difficult to spread. Quite a few universal languages have been invented over the past few centuries, and a couple, like Esperanto, have dedicated users even today (Esperanto serves as an auxiliary language – it's no one's native tongue). But even if we had a universal language, it would soon begin to break up into minority tongues." (Dennis Baron in *Lingua Europa*, article published in the Microsoft's web magazine *Slate*, Oct 20, 1999)

*Spotlight* (a German magazine written in English to support ESL students), published in its March 2000 issue a lengthy article by David Crystal about *The future of language*. The editors want to know:

- Do you believe it is important to preserve lots of different languages?
- Should the world instead move towards a common language?
- If so, should that language be English, or should it be a neutral language such as Esperanto?

Send your comments to: Spotlight Verlag, Spotlight Redaktion (Language), Fraunhoferstr. 22, DE-82152 Planegg, Germany; fax: +49-89-85681105; e-mail: [spotlight@spotlight-verlag.com](mailto:spotlight@spotlight-verlag.com). According to *U.S. News & World Report* (Apr 3, 2000), [www.esperanto.se/kiosk/engindex.html](http://www.esperanto.se/kiosk/engindex.html) boasts 15,384 links to news sources in 213 countries.

"Shortwave radio stations broadcast programs in dozens of different languages, one of which is the artificial language Esperanto. But where in the world are there large enough groups of people who use Esperanto to make it worthwhile to broadcast in that language? Where is Esperanto widely taught and in common use?" asked a reader The Straight Dope, whose staff answered in the online column of Apr 3, 2000. The answer starts with: *Kie estas grandaj grupoj paroli Esperanton? La ne longa respondo estas "Tero."* The author of the answer continues by confessing that "[h]aving studied Esperanto off and on for 20 years, I'm glad for the occasional chance to show off". We wish s/he also showed up at ELNA conventions and/or other Esperanto gatherings in our part of the [green] world. *The Times of India* (Apr 11, 2000) published a lengthy interview with Dr. Abdul Salam, President of the Esperanto Federation of India. Says Dr. Salam: "Over 5000 Esperantists attend the Universal Esperanto Congress held in various countries." How is that for wishful thinking?

Lee Miller (Columbia MO) has published yet another letter in favor of Esperanto in *Columbia Daily Tribune* (Apr 19, 2000).

Congratulations to Peggy Dolter (Saint Louis MO), who published a brief letter about Esperanto in *St. Louis Review* on Apr 21, 2000, in which she mentioned ELNA and our 800-number; and to June Fritz (Wilber NE), whose letter about Esperanto appeared in *Lincoln Journal Star* on Apr 23, 2000.

A lengthy (over 4 pages) article titled *A Farewell to Esperanto?* appeared in the May/June issue of *Lingua Franca*, "the review of academic life." It is referred

to on the cover as *Esperanto: Language of LOVE*. The first page of text is embedded in the Esperanto flag. An excellent picture of Zamenhof appears in the middle of the second page. One of the best articles about Esperanto ever published in an English language magazine: somewhat nostalgic but not condescending.

*Provu Esperanton!* says Sharon Harris in the May/June 2000 issue of *Transitions Abroad* in a dense article about Zamenhof's "Lingo (sic!) Internacia." Too bad that the author gave as contact addresses (in an American magazine!) the addresses of Universale (sic!) Esperanto Asocio and Esperanto Centre in London, but not ELNA's.

---

## Leteru

Tapani LAPPALAINEN, Hauralantie 48, FI-37500 Lempäälä, Finnlando, 42-jara fraŭlo serĉas gekorespondantojn. Interesiĝas pri diversaj temoj.

M. Mehdi NORUZI, Box 838, Neshat St., IR-81465 Esfahan, Irano, 30-jara fraŭlo ŝatus korespondi kun usonaninoj. Godwin I. UHUNMWANGKO, N° 144, 2<sup>nd</sup> Gas Circular Rd, Benin City, Niĝerio, 27-jara flegisto, E-komencanto deziras korespondi por altigi sian lingvonivelon.

Chike Augustine CHIKE, c/o F.N. Muojekwu, N° 3 Ochumba Close, Achara Layout, Inugu, Niĝerio, komencanto deziras korespondi por plibonigi sian lingvonivelon.

Dariusz PIĄTKOWSKI, ul. Św. Franciszka 21/12a, PL-93485 Łódź, Pollando, komencanto deziras korespondi pri diversaj temoj.

Viro en malliberejo jam finfarinta la 10 senpagajn E-lecionojn, serĉas telefonan amikon por ekzerci sin en Esperanto. Li mem pagos por la telefonvokoj. Li ankaŭ ŝatus ricevi helpon por siaj verkado kaj tradukado. Se vi havas la tempon kaj la emon, bonvolu kontakti: Michael Beard, 05237-000, PO Box 26020, Beaumont TX 77720.

**LABORO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR PLI PACA MONDO, LA, Ulrich LINS.** See why UEA is a reasonable nominee for a Nobel Peace prize. Number 36 in the Esperanto-dokumentoj series. Available also in English (ED045). 2000. 12p. 210x150. Paper. Netherlands. ISSN 0165-2524  
**EDE036** **\$2.85**

**LINGVO INTERMONDA, Dolcxamar.** This pleasant album has the subtitle "Lingvo intermonda" and therefore aims to show influences wider than merely international. I am unsure that they convince me of interplanetary style, but more importantly this is a collection of songs which have melodies and arrangements worth hearing again and again. The style is a mixture of EuroPop and techno. All lyrics are quite clear and worthy of attention. 2000. CD + 8-page booklet. France.  
**LIN006** **\$16.90**

**MIRINDA SORĈISTO DE OZ, LA, L. Frank BAUM.** Trans. H. R. DREYER. A new translation of the first and most popular in the series of novels, published for the centennial anniversary of its first edition. A chance to remind yourself of the magic of the Land of Oz. Illustrations by W. W. DENSLOW. 2000. 146p. 215x135. Paper. USA. ISBN 1-882251-31-8  
**MIR003** **TBA**

**MR. TOT AĈETAS MIL OKULOJN, Jean FORGE.** Original mystery novel concerning invasion of privacy. Used as the basis of a popular film Second edition. Reprint 1973. 244p. 180x125. Paper. Finland. ISBN 951-9005-29-3  
**MRT001** **\$9.70**

**MULTISENSORAJ LANDPEJZAĜOJ, Aleksandra KOWALCZYK.** This is either wacky pseudoscience or a profoundly new interpretation of the relationship between geographical types and psychological reactions. Either

way this is a stimulating treatise, whether your reactive urge is to debunk the entire thesis or admire its grandiose insights. At the very least this presents a useful exercise of the full range of the vocabulary of geography. 1999. 19p. 205x140. Paper. Poland. ISBN 83-87145-10-6  
**MUL001** **\$1.50**

**OKULO, Stefan MacGILL.** A fun teaching tool, full of silly illustrations (by Mónika MOLNÁR) and funny texts which emphasize verbs. Although aimed primarily at youngsters, this booklet would also work quite well for adults. Written for use in Unesco's program "Linguapax". Includes a list of all words used, and teachers' tips for each lesson. 1999. 40p. 215x160. Paper. Hungary.  
**OKU001** **\$5.00**

**SIMPTOMOJ, Gonçalo NEVES.** The latest collection of poems from this young award-winning author who is widely recognized as one of the most important living writers of Esperanto. Quite a wide range of subject matter and style, but a uniformity of cleverness. Only a true master can still write about Esperanto poetics without being maudlin, and about erotic triads without being vulgar. If you haven't yet encountered this young star, here is a good chance! If you already know Neves' work, you won't want to miss this. 1999. 72p. 210x135. Paper. Belgium. ISBN 90 71205 86 X  
**SIM001** **\$9.80**

**VERAJ INTERPAROLOJ DE SOKRATO, Han RYNER.** Trans. E. LANTI. An amusing re-interpretation of the philosophy of Socrates, presented as "lost" dialogues and "contemporary" commentary, including a new account of Socrates' death. Especially meaningful for those already familiar with Socratic teachings, but also appropriate for those who don't know the "father of Western philosophy". 1999. 164p. 205x140. Paper. France.  
**VER003** **\$9.00**

**Esperanto League for North America**  
**PO Box 1129**  
**El Cerrito CA 94530**

Non-Profit Org  
US POSTAGE  
PAID  
Permit #1040  
Leesburg, FL  
34748